# Letero al junaj homoj

D-ro Lothar Gassmann

Karaj amikoj, vekiĝu, oni provas vin trompi!

**Estis al vi dirite:** „Elvivu viajn impulsojn; tiel vi estos feliĉaj!“
**Sed la vorto de Dio diras:** *„Feliĉaj estas la kore puraj, ĉar ili vidos Dion“* (Mateo 5,8). *„Ĉar malĉastulojn kaj adultulojn Dio juĝos“* (Hebreoj 13,4).

**Estis al vi dirite:** „Produktu la surdigan muzikon, plifortigu la amplifikatoron, tiam vi fartos bone!“
**Sed la vorto de Dio diras:** *„En kvieteco kaj fido estus via forto“* (Jesaja 30,15). *„Kaj la paco de Kristo prezidu en viaj koroj … Kaj instruu kaj admonu unu la alian per psalmoj kaj himnoj kaj spiritaj kantoj“* (Koloseanoj 3,15.16).

**Estis al vi dirite:** „Elŝaltu vian racion, malstreĉu vin kaj rezignu pri ia ajn kritiko! Meditu pozitive kaj plivastigu vian konscion per meditado, drogaĉoj kaj psikaj teknikoj!“
**Sed la vorto de Dio diras:** *„Prudentiĝu do, kaj sobriĝu por preĝoj!“* (1 Petro 4,7). *„Estu sobraj, vigladu! via kontraŭulo, la diablo, kiel leono blekeganta ĉirkaŭiras, serĉante, kiun li povos forgluti; lin rezistu, konstantaj en la fido!“* (1 Petro 5,8.9).

**Estis al vi dirite:** „Lernu okultajn procedojn - magion, sorĉadon - , tiel vi atingas viajn supernaturajn sciojn kaj potencon!“
**Sed la vorto de Dio diras:** *„Ne devas troviĝi inter vi iu, kiu trairigas sian filon aŭ filinon tra fajro, aŭguristo, antaŭdiristo, magiisto, sorĉisto, nek subĵurigisto, nek elvokisto de spiritoj, nek signoklarigisto, nek esploristo de mortintoj; ĉar abomenaĵo por la Eternulo estas ĉiu, kiu faras tion“* (5 Moseo 18,10-12). *„Ekstere* (ekster la ĉiela urbo) *estas la hundoj kaj la sorĉistoj kaj la malĉastuloj kaj la mortigistoj kaj la idolanoj, kaj ĉiu, kiu amas kaj faras mensogon*“ (Apokalipso 22,15). Ilia finloko tamen estos „*… en la lago, brulanta per fajro kaj sulfuro; tio estas la dua morto*“ (Apokalipso 21,8).

**Estis al vi dirite:** „Iru tien, kie okazas grandaj signoj kaj mirakloj, kie aperas majestaj vizioj kaj revelacioj kaj vi povas atingi tute apartajn travivaĵojn!“
**Sed la vorto de Dio diras:** *Amataj, kredu ne al ĉiu spirito, sed provu la spiritojn, ĉu ili estas el Dio; ĉar multaj falsaj profetoj eliris en la mondon“* (1 Johano 4,1). *„Ĉar leviĝos falsaj kristoj kaj falsaj profetoj kaj faros grandajn signojn kaj miraklojn, tiel ke ili forlogus, se eble, eĉ la elektitojn“* (Mateo 24,24).

**Estis al vi dirite:** „Estu vi ĉiuj unu, ja ĉiuj religioj adoras la saman dion!“
**Sed Dio diras:** *Mi estas la Eternulo, via Dio ... Ne ekzistu ĉe vi aliaj dioj antaŭ Mi!“* (la unua ordono de Dio, 2 Moseo 20,2.3). *„Ne lernu la konduton de la nacioj, kaj ne timu la signojn de*

*la ĉielo, kiel la nacioj ilin timas ... Ĉar la aranĝoj de la nacioj estas vantaĵo ... Ili estas kiel kolono ĉirkaŭforĝita"* (Jeremio 10,2.3.5). Jesuo Kristo, la filo de Dio, diras: *„Mi estas la vojo kaj la vero kaj la vivo; neniu venas al la Patro krom per mi"* (Johano 14,6).

**Estis al vi dirite:** „Ĉiu homo estas infano de Dio; ja en ĉiu homo loĝas la Spirito de Dio."
**Sed la vorto de Dio diras:** *„Sed al ĉiuj, kiuj lin akceptis* (la lumon - Jesuon Kriston), *li donis la rajton fariĝi filoj de Dio, al la kredantoj al lia nomo, kiuj … naskiĝis el Dio"* (Johano 1,12 s.). *„Kaj perfektigite* (Kristo) *li fariĝis la fonto de eterna savo al ĉiuj al li obeantaj"* (Hebreoj 5,9).

**Estis al vi dirite:** „Ne parolu tamen pri peko, sed nur pri eraroj, paneoj, devojiĝoj kaj malsukcesoj! Bono kaj malbono, tio estas la sama afero!"
**Sed la vorto de Dio diras**: *„Sed peko pereigas gentojn"* (Sentencoj 14,34). *„Ve al tiuj, kiuj la malbonon nomas bono kaj la bonon malbono, kiuj mallumon faras lumo kaj la lumon mallumo, kiuj maldolĉon faras dolĉo kaj la dolĉon maldolĉo!"* (Jesaja 5,20).

**Estis al vi dirite:** „Alaŭskultu sin mem; ja vi en vi mem trovos la veron, se vi nur sufiĉe longtempe meditos!"
**Sed la vorto de Dio diras:** *„Ĉar el la koro eliras malvirtaj pensoj, mortigoj, adultoj, malĉastaĵoj, ŝteloj, falsatestoj, blasfemoj; jen tio, kio profanas la homon"* (Mateo 15,19-20). *„Ĉar mi scias, ke en mi (tio estas en mia karno) bono ne loĝas"* (Romanoj 7,18.25).

**Estis al vi dirite:** „Prenu ĉion tiel, kiel vi mem kredas kaj vivas; lasu tamen al ĉiu ties kulturon kaj ties vivstilon!"
**Sed la vorto de Dio diras:** *„Admonu la senordulojn!"* (1 Tesalonikanoj 5,14). *„Aŭ ĉu vi ne scias, ke la maljustuloj ne heredos la regnon de Dio? Ne trompiĝu: nek malĉastuloj, nek idolanoj, nek adultuloj, nek molmoruloj, nek viruzaĉantoj, nek ŝtelistoj, nek aviduloj, nek drinkuloj, nek insultantoj, nek rabemuloj, heredos la regnon de Dio. Kaj tiaj estis kelkaj el vi; sed vi laviĝis, sed vi sanktiĝis, sed vi justiĝis en la nomo de la Sinjoro Jesuo Kristo kaj en la Spirito de nia Dio"* (1 Korintanoj 6,9-11). Pro tio: Kontraŭstaru la devojigadon per malbonaj modeloj en gazetoj, radio, televido kaj interreto, parolantaj pri »amo«, sed opiniante »diboĉon« kaj vin ili tiel kondukas al pereo! Tenu firme la ekzemplon de la filo de Dio Jesuo Kristo, kiu estas pura kaj sankta, montranta pere de sia vivo al ni, kiel procedas la vera amo! Kontraŭstaru la devojigon per la kontraŭbiblia religia miksado kaj ekumenismo! Firme tenu la kvaropan »sola« en la Skribaĵo: sola Skribaĵo, sola Kristo, sola graco, sola fido! Kontraŭstaru la devojigon pere de la kontraŭbibliaj signoj kaj serĉado de mirakloj! Firme tenu la plej grandan miraklon: la vundojn de Jesuo Kristo, kiu sur la kruco oferis sian vivon por nia savo kaj en la tria tago mirakle releviĝis el la mortintoj! Kontraŭstaru la devojigon per – bedaŭrinde ankaŭ en »kristanaj rondoj« tre disvastigita »kulturo de amuzo«, kiu eĉ la krucon de Jesuo Kristo falsifas en objekton de distro kaj tiel basfemas la nomon de Dio! Firme tenu la triunuan Dion, kiu samtempe estas sankta kaj justa, amanta kaj mozerikorda! Kontraŭstaru la mistikan nebulon, kiu al vi sugestas, ke en vi laŭnature loĝas la »fajrero de diaĵo«! Firme tenu la fakton pri kompleta korupteco kaj perditeco de la homa koro, kiu plene dependas, koncerne savon, sole de la graco! Kontraŭstaru la »kulturon de la muziko«, kiu asertas per idolanaj elementoj (ekz. per ekstazaj elementoj, kiel sovaĝaj ritmoj, ripetado de

vortoj en formo de mantrao aŭ ankaŭ per elstare malrapidaj melodioj, kiuj kondukas en transon) oni povus allogi homojn por la kristana kredo! Firme tenu la bonefikajn spiritajn kantojn, venantaj el mallaŭta, tenera koro! Kontraŭstaru la spiriton de la tempo, ja malantaŭ ĝi sin kaŝas la spirito de Satano! Firme tenu la Spiriton de Dio, kiu vin elprenas el tiu ĉi efemera mondo kaj vin kondukas en plenan veron! *„Proksima estas la Eternulo por ĉiuj, kiuj Lin vokas, por ĉiuj, kiuj vokas Lin sincere“* (Psalmo 145,18).

La aŭtoro de la germana kaj angla originalo kaj posedanto de la aŭtoraj rajtoj: d-ro de teol. Lothar Gassmann, Am Waldsaum 39, D-75175 Pforzheim, Tel. 07231-66529, Fax 07231-4244067, E-Mail: LOGASS1@t-online.de, Homepage: www.L-Gassmann.de Tiun ĉi tekston oni rajtas distribui sen ŝanĝoj kaj indikante la fonton. Tradukoj en aliajn lingvojn estas permesataj kaj dezirataj (ni petas specimenon). Esperantigis V. O.